



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBAHN

Numero 3 • Majo/Julio 1959

Ni kongresis en Aŭstrio de la 9. ĝis 18. 5. 1959

Post malvarmo en nia hejmlando ni sopiris sunon kaj mildan aeron. Ambaŭ ni trovis, kiam ni elvagoniĝis en la urbo de nia 11a IFEF-kongreso, en Linz/Danubo. Voĉo en lingvo Esperanto bonvenigis nin per laŭtparolilo kaj sagoj gvidis nin tra la stacio ĝis la stacia akceptejo. Bonege funkciis la transporto al la kongresejo same kiel poste al la loĝejoj. Oni veturigis nin per aŭtobusoj aŭ aŭtomobiloj al la dezirataj lokoj. Grandaj Esperanto-flagoj ornamis la stacidomon kaj flirtis de sur la urbdomo. La kongresejo (Kaufmännisches Vereinshaus) estis klare indikita per grandaj rubandoj. Kiel kutime afablaĵ LKK-anoj deĵoris en la kongresejo, eldonis multe da papero al la kongresanoj kaj forprenis ankoraŭ multe pli da mono de ili.

Jam sabaton vespere evidentiĝis la granda avantaĝo de tiu ĉi kongresejo, favore situanta en la centro de la urbo, ĉar ĉiuj aranĝaĵoj, ĉiuj ĝicetoj, do la tuta kongreso trovis lokon en ĝiaj salonoj. En la plej granda salonego amasiĝis la kongresanaro, por festi la interkonatigan vesperon, svarmis kiel abeloj de tablo al tablo kaj salutis, salutis,

salutis la malnovajn geamikojn, apenaŭ aŭskultante la belsonan voĉon de samideano Starke el Nürnberg kaj la iom tro malfortan orkestreton. Domaĝe por la artistoj, kiuj faris sian plej bonan, sed en interkonatiga vespero neniam estas atentemo por artaĵoj.

Venis dimanĉa mateno. Denove ni kunvenis en la granda salonego. Plenplena ĝi estis, ĉar ne nur la gekolegoj el tuta Eŭropo, sed ankaŭ multe da linzaj kaj aŭstraj esperantistoj deziris travivi la solenan inaŭguron. Ĉestis entute 484 gekongresanoj el 17 landoj, nome Belgio 2, Britio 5,



La kongresanoj antaŭ la moderne rekonstruita ĉefstacidomo de Linz.

Bulgario 2, Danlando 31, Finnlando 4, Francio 67, Germanio 79, Hispanio 6, Hungario 5, Italio 23, Jugoslavio 45, Nederlando 37, Norvegio 3, Polujo 1, Svedio 38, Svisio 6, Aŭstrio 130.

Vere festa aspektis la salonego kun ĝiaj lustroj, altaj kurtenoj, kun ĝia per floroj ornamita scenejo, en kies mezo vidiĝis grandega emblemo de la kongreso kaj skribaĵo: „11. IFEF-Kongreso“, flankitaj de du aŭstraj flagoj. Festa atmosfero regis, kiam la uniformigita fervojista orkestro per majstre prezentata muziko kondukis al la paroladoj de la oratoroj. El ili ni menciuj antaŭ ĉio la afablajn vortojn de la **prezidanto de la fervoja direkcio Linz, Hofrat d-ro Leopold Kassecker**, kiu samtempe anstataŭis la ministron por trafiko kaj elektraj aferoj, Dipl. ing. Karl Waldbrunner, kaj la generaldirektoron de ÖBB, Hofrat d-ro Maximilian Schantl.

Parolante en Esperanto, li kore bonvenigis nin, dirante, ke li mem lernis kaj eĉ instruis Esperanton antaŭ pli ol tridek jaroj. Tre klare li akcentis, ke ĝuste la fervojistoj ĉiam denove spertas la malfacilaĵojn de la lingva diverseco en internaciaj fakaj konferencoj same kiel dum libertempaj vojaĝoj. „Pruvu al niaj profesiaj kolegoj, al niaj sindikatanaj kaj al la tuta publiko, ke viaj kunvenoj malgraŭ la internacia partoprenantaro okazas en tute simpla maniero“, li elvokis kaj daŭrigis: „Ĝojigus nin ĉiujn, se ekzemple niaj konduktoroj aŭ aliaj fervojistoj en la deĵoro kontentige povus uzi Esperanton. Tiam ne plu okazus, ke precipe lingvo-kapablaj ofiĉistoj, kies bruzo estas ornamata per tri aŭ kvar lingvo-ŝildoj, senhelpe kontraŭstaras slovenojn, ĉeĥojn aŭ hungarojn.“

Nome de la landa registaro salutis s-ro Harringer. Sekvis la **urbestro, d-ro Ernst Koref**, kiu ankaŭ en Esperanto varme salutis la ideojn kaj intencojn de nia movado. Poste parolis la reprezentantoj de UEA, SAT, de diversaj fervojaj administracioj, sindikatoj, kulturaj organizoj, kaj la delegitoj de la ĉeestantaj IFEF-sekcioj. La prezidanto de IFEF, kol. de Jong, substrekis la necesecon al amikeca kongreslaboro kaj transdonis al la maljuna, malnova, neniam laca amiko de nia faka movado, s-ro **Hofrat Hugo Steiner** el Vieno binitan ekzempleron de la IFEF-Bulteno el la lastaj dek jaroj. Fektoratoro ankaŭ estis s-ro Hofrat Steiner. Multon citante el la leteroj de Zamenhof, li skizis bildon pri vivo kaj ideoj de la kreinto de la Internacia Lingvo. Finiĝis la solenaĵo per komuna kantado de la Himno.

Posttagmeze, post fotografigo antaŭ la ĉefstacio, longa vico da aŭtobusoj ruliĝis tra la urbo. Tiel LKK prezentis al ni urbon kaj ĉirkaŭaĵon. Restos neforgesebla impresoj por ni ĉiuj, kiel ni staris sur la montetoj oriente de Linz malsupren rigardante al la centoj da domoj, dekoj da preĝejoj, al la fumo de la ŝtaluzinoj, al la kurba bendo de la Danubo, al la vastaj, verdaj deklivoj, kiuj perdiĝis en malklara malproksimo. Tiel ni jam de supre

povis rigardi fabrikojn, havenon kaj aliajn punktojn, kiujn ni dum la sekvontaj tagoj pli detale povis viziti. Eĉ pli agrabla estis la posta veturado al la monto Pöstlingberg per la plej kruta adhera fervojo de Eŭropo (106 po-milo), kies motorvagonoj ne rajtas tiri duan vagonon kaj pro tio suprengrimpas unu post la alia en distanco de 20 ĝis 30 metroj. Belega printempa vespero estis, kiam eklumiĝis miloj da lanternoj en la valo, kiam brilis la steloj sur klara ĉielo, dum ni sidis en la monta restoracio, ĝuante aŭstrian vinon.

Skribante pri la belaĵoj de Linz, ni nepre ne forgesu la iaman abatejon **St. Florian**, situanta enmeze de krono de verdaj montetoj. Laboris kaj mortis ĉi tie la konata komponisto Anton Bruckner. Estis emocia surprizo, kiam ni aŭskultis la faman Bruckner-organon en la eksterordinare bela barokpreĝejo. Sama surprizo estis la monaĥeja biblioteko kun pli ol 110000 volumoj. Krom tio dum la kongrestagoj oni havis eblecojn viziti diversajn fabrikojn por pano, fromaĝo, biero, infanvilaĝon, modernajn lernejojn kaj preĝejon, fervojan ĉefirparejon, nitrogenuzinon, preskaŭ iom tro multe por nur malmultaj tagoj, kies ĉefa celo ja estas — fake kongresi.

La fakaj laboroj okazis en la malgranda salono, kiu bedaŭrinde neniam pleniĝis dum la laborarangoj. Ni unue donu ĉi tie koncizan superrigardon pri la **laborkunsidoj**:

Post enkondukaj vortoj de la prezidanto, la sekretario Lok transdonis al la prezidanto kaj al la redaktoro binitajn ekzemplerojn de la IFEF-Bulteno el la lastaj dek jaroj. Kol. Zoratti (Italio) transdonis al la estraro memfaritan rozbukedon metalan kaj Giessner (Germanio) donacis al la estraro la EFG-gramofon-diskon n-ro unu nome de Esperanto-Filmo-Germanujo. Li kromsenkulpegis s-ron Rummel, kiu por deĵoraj kaŭzoj ne povis ĉeesti. La sekretario i. a. laŭlegis salutvortojn de la ĉefadministracio de la Germana Federacia Fervojo. La germana delegito deklaris, ke la aarhusa protokolo koncerne la fakprelegon ne klare respegulas la tiamajn diskutojn kaj atentigis al la diferenco inter la elspezoj por la IFEF-Bulteno kaj la enspezoj de IFEF. La prezidanto disigis tiajn timojn. La svisa delegito (Walder) sugestis, ne aperigi gajnon en la bilanco, sed disponigi la koncernen sumon al la Zamenhof-jaro. Tion oni malaprobis. Germanio proponis apartan kolekton por la Zamenhof-fondaĵo en la kongreso, pro kio la aŭskultantoj varme aplaudis. Kol. Barnickel (Germanio) substrekis, ke ni fake devas labori, sed ne elspezi monon por taskoj, kiuj ne estas la niaj.

La kongresproponoj jene estis traktataj:

Proponoj 1 kaj 2 akceptitaj. La **tria propono** pri la nova IFEF-insigno same estas akceptita kontraŭ la voĉoj de Germanio kaj Hispanio, ĉe sindeteno de Britio, Francio kaj Jugoslavio. La germana delegito agnoskis, ke la insigno ja estas

bela, tamen kontestis, ke por faka kaj relative malgranda organizo kiel IFEF speciala insigno estas necesa.

Post la diskuto pri la **4a propono** la prezidanto rekomendis agi laŭ la germana instigo kaj la propono formale estis reprenata. Dum la diskutado evidentiĝis, ke en Jugoslavio venontjare Esperanto aperos en la horaro kaj ankaŭ por Aŭstrio kaj Danio oni povas atendi favoran evoluon turilatan.

Per la **5a propono** Germanio intencis atingi, ke la titolo de la IFEF-organo estu pli preciza, ĉar **unuavice** ne temas pri fervojista, sed pri esperantista organo. La propono estis malakceptata pro la eventualaj kostoj kaj, ĉar oni ne jam denove deziris ŝanĝi la nomon. Tamen la nuna nomo estas rigardata provizora. Precipe interesan kaj verŝajne tre fruktendonan rezulton alportis la **6a propono**. Pro manko da tempo la problemo „fakprelegoj“ estis kvinonata al speciala komitato, konsistanta el kvin kolegoj el Aŭstrio, Francio, Jugoslavio, Svislando sub gvidado de la germana delegito Giessner. Tiu komitato kunvenis post la fakprelegoj kaj supozeble jam trovis solvon por la iom komplika situacio en la venonta kongreso.

La **Redaktora Komitato** prefere okupis sin pri gazetaraj problemoj. Pri ĝi oni legu en la koncerna raporto en la IFEF-organo. Precipe grava estis kompreneble la kunveno de la **Terminara Komitato**, kiun gvidas la germana kolego Ritterspach (aparta raporto sekvos venontfoje).

Merkredon posttagmeze okazis la **fakprelegoj**. Tiun plej gravan aranĝaĵon de la kongreso laŭŝajne la kongresanoj plej malmulte taksis. Je la komenca tempo sidis en la salono 6 aŭskultantoj, en literoj: ses. Mikrofono bedaŭrinde nur post 40 minutoj estis preta, tiel ke la prelego, kies temo devis esti „**Evoluo kaj nuna stato de la por-klientaj horaroj**“, nur post 50 minuta hezitado komenciĝis. Sed denove montriĝis, ke la ĝisnuna sistemo de la fakprelegoj ne taŭgas kaj ke ne estas eble por la ĉi-jara afergvidanto, kol. Bürger el Linz, ĝustatempe kaj tutklare kompili kontentigan resumon el la ensenditaj laboroj de la diversaj landoj. Pro tio li estis elektinta anstataŭan, ion similan, sed multe pli ĝeneralan temon.

Li laŭtlegis tre interesan resumon el prelego, kiun estis verkinta Hofrat d-ro B. Kepnik pri la temo: „**Evoluo kaj esenco de la fervoja horaro**“. Same alloga estis la dua prelego kun koloraj lumbildoj, faritaj de kol. Ulrich el Linz, pri la signaloj de la aŭstria fervojoj. Ekestis multaj demandoj kaj vigla diskutado. Pli ol domaĝe, ke en la prelegoj nur ĉeestis relative malmultaj personoj kaj certa kvanto el ili tute ne estimis la oratoron, habilante kun najbaroj kaj promenante en la salono.

Precipe grava kompreneble estis la pritrakto de la punkto 7 de la tagordo, ĉar jam de longe

anoncis sin malfacilaĵoj pro la **novelekto de la IFEF-estraro**. Kol. Lok, la longjara sekretario kaj motoro de nia faka asocio, emeritiĝis kaj pro tio ne plu havos okazon, viziti la kongresojn. Sed kongreso sen sekretario ne estas imagebla. Aliaflanke la nove elektita sekretario bezonas tempon por konatiĝi kun ĉi tiu komplika tasko. Oni do trovis metodon, laŭ kiu kol. Lok povos resti en la estraro ankoraŭ por kelka tempo.

Kiel venonta kongresloko en 1960 definitive estas elektita Helsinki, kiel provizora loko en 1961 Barcelona. Por 1962 jam okazis duelo inter Brüssel kaj Budapest. Tiuj vere interesaj urboj kaj landoj espereble instigos multajn gekolegojn lerni nian lingvon.

En tiu kongreso finfine realiĝis malnova revo de niaj francaj amikoj. Dum jaroj ili estis klopodintaj, kolekti desegnaĵojn de infanoj fervojistaj el la tuta mondo. Nun ni povis rigardi la sukcesan rezulton. Estus valore, skribi apartan raporton pri tiu ekspozicio, kiu jam per sia ekzistado pruvas la sencon de Esperanto. La ĝeinfanoj de nia kolegaro, kelkaj iom pli aĝaj kaj aliaj tute junaj de nur kvin jaroj, el Eŭropo, Aŭstralio kaj multaj el Japanio liveris tute diversspecajn, bone observitajn laborojn, tiamaniere kontribuante al nia komuna celo.

Alia ekspozicio kiel kompletigo al la fakprelegoj



Kiel japanaj infanoj fervojistaj observas la fervojojn!

estis aranĝata. Ĝi prezentis intereseĝan superrigardon pri la horarmaterialo de Eŭropo. Ĉiuj landaj asocioj, parte eĉ tre amplekse, estis kunportintaj horarojn porklientajn, oficialajn kaj privatajn kaj en formo de prospektoj, deĵorajn en formo de libroj kaj de tabeloj kaj landkartojn. Altvaloraj ekzempleroj troviĝis inter ili. Tiu ekspozicio estis riĉa trezoro por ĉiu fervojisto. Estus dezirinde, ke ambaŭ ekspozicioj povus esti disponigataj laŭvice al la landaj asocioj.

Gravege estis, ke la **prezidanto de la ÖBB direkcio Linz, Hofrat d-ro Kassecker**, akceptis la IFEF-estraron kaj delegitojn en sia oficejo kune kun la decernentoj por juraj demandoj, por trafiko kaj por funkcia fako. Li ne nur afable regalas la ĉestantojn, sed la konversacio vigle fluas, parte helpe de Esperanto-interpretado, parte pere de angla, franca kaj germana lingvoj. La ĝentileco de la prezidanto multe superis tion, kio estas kutima je tiaj okazoj. Oni povas esti konvinkita, ke tiu malnova amiko de nia afero estontece ankoraŭ pli favore agados en nia senco. Post la akcepto sekvis tre agrabla kunesto de estraro kaj delegitoj en la rava klubsalono de la linza fervojista grupo. La tutan salonon ili mem instalas per kolektita mono kaj per propraj fortoj. Oni tuj sentis sin hejme, sidante sur modernaj ŝtalmebloj. Eĉ ekzistas radioaparato, deĵora telefono kaj aparta vestaĵdeponejo, kaj por ĉio la fervojo pagas purigadon, hejtadon kaj lumigadon. Imitinda ekzemplo por ĉiuj fervojistaj Esperantogrupoj!

Riĉenhavaj estis ankaŭ la **kongresaj vesperoj. Lundo** estis dediĉita al **aŭstria muziko**, al melodioj de Strauß, Dostal, Lehár kaj Millöcker, bele prezentitaj de L. Wollner (soprano) kaj de la magistrata orkestro. **Mardon** ni festis la **internacian balon**. Oni ne troiĝas, dirante, ke tiu balo estis la plej brila ĝis nun iam aranĝita en IFEF-kongreso. Ĉu estis la mirige bela ekstera kadro de la solena salonego, ĉu la graciaj gedancantoj en ĉarmaj roboj kaj nigraj frakoj, kies dancarto superis ĉies atendojn, ĉu la ĝeinfanetoj de nia kolego Geroldinger, kiuj paŝon post paŝo brave dancis tute solaj en la granda salono, vestitaj en kostumoj el la mozarta epoko, ĉu estis la fakto, ke ni havis multe, multe da spaco por danci sur bone flegita pargeto, ĉu la belsona muziko de niaj fervojistaj kolegoj, do ĉio tio kontribuis al harmonia vespero en gaja, internacia rondo. **Merkredon** ni kunvenis por rigardi **tri sonfilmojn de Esperanto-Filmo-Germanujo**: „Vojaĝo al Marseille“, „De Braunschweig al Harz“ kaj „Impresoj el la 43a UK en Mainz“. Spite al la malbona akustiko en la iom tro granda salonego la impresado de tiuj amatoraj filmoj, faritaj de germanaj fervojistoj, estis bona. Klare estis ekkoneblaj la progresoj, kiujn faris la EFG-kolegoj de unu filmo al la alia en sia kuraĝa entrepreno. Ke ili daŭrigu siajn klopodojn por la

bono de Esperanto! Venis la lasta tago, la **ekskurstago**, kun pluvo kaj malvarmo —, bedaŭrinde. Ni ne povis multon observi tra la fenestroj de nia speciala trajno, grandanime disponigita de ÖBB por longdaŭra rondveturado tra kelkaj el la plej belaj regionoj de Aŭstrio. Des pli bone funkciis la bonhumoro en la trajno, kies lokomotivo estis ornamita per grandegaj kongresinsignoj. La dancvagono baldaŭ pleniĝis de dancemuloj kaj trinkemuloj. 7 horojn ni veturis tra Steyr — Hiefiau — Selzthal al Bad Ischl. Tagmeze eĉ iam kaj tiam la suno trapenetris la nubojn kaj permesis al ni ĉiam novajn rigardojn al la grandiozaj montpintoj. Ni ne forgesu raporti pri la abunda manĝpakaĵo, kiun ni ricevis en la trajno. Ni same ne forgesu la loterion, kiu fariĝis agrabla kontribuo al la IFEF-buĝeto kaj al Zamenhof-fondaĵo.

Bedaŭrinde el la malalta nombro kaj la kvalito de la gajnaĵoj oni devas konkludi, ke multaj kongresanoj nenion aŭ bagatelajn kunportis, sed tamen deziris gajni ion. Cetere, mi aŭdis de kolego, ke li jam gajnis la kvaran insignon de la IFEF-kongreso Verona.

En Bad Ischl akcepto flanke de la urbestro en la stacio, marŝado kun folkloro orkestro kaj dikventra direktanto al Kurhaus, kie post duhora atendado ni fine povis manĝi. Sekvis alpagaj dancoj, kantoj, kaj la prezidanto de la eŭropa kulturorganizo fervojista (FISAIC), s-ro Mollion, honoris la prezidanton de la aŭstraj fervojistoj esperantistaj, dipl. ing. Fritz Tschom kaj ties kolegon Louis Angermayr per ora kaj arĝenta medaloj por ilia porhomara laborado. Tio estis varme aplaudata gesto de nia estimata amiko Mollion al la aŭstraj kolegoj kaj al la tuta movado.

Per mallongaj vortoj la IFEF-prezidanto de Jong finis la kongreson kaj petis, labori en la hejmaj landoj. Tion ni faru, ĉiu sur sia loko.

La **postkongreso** okazis en **Vieno**. Per danuba ŝipo ni veturis dum denove bela vetero al la aŭstria ĉefurbo. Pri simila programo jam estis raportita antaŭ du jaroj okaze de la tiama feria semajno. Mankas loko por ripeto. Sed ni devas menciigi la **akcepton de la delegitoj kaj estraro flanke de la generaldirektoro de ÖBB, Hofrat d-ro Maximilian Schantl**. Jen klara pruvo, kiel alte taksas la administracio de la aŭstraj fervojistoj niajn klopodojn, nian volon, nian laboradon por la bono de la fervojistoj kaj la klientaro. „Fervojista kunlaboro kondiĉas recipokan komprenon“ estas lia opinio. Grave estis, ke ankaŭ la estro de la fervojista sindikato, Richard Freund, ĉestis kaj promesis sian helpon por la estonteco.

Alia akcepto okazis flanke de la **Esperanton parolanta urbestro de Wien, Franz Jonas, kun lia ĉarma edzino**, same reganta nian lingvon. Jen unu flanko de niaj vienaj tagoj; alia permesis al ni ĝui la unikan atmosferon de tiu urbo. Dankon al nia amiko, Hofrat Steiner kaj liaj helpantoj, pro ĉio, kion ili faris por ni. Giessner

Das Wichtigste aus vorstehendem Kongreßbericht

Der 11. Internationale Kongreß der Eisenbahner-Esperantisten fand in Linz/Donau statt. Im Kaufmännischen Vereinshaus stand ein großartiges Kongreßgebäude zur Verfügung, in dem alle Veranstaltungen abgehalten werden konnten. In festlichem Rahmen wurde am Sonntag früh der Kongreß eröffnet, bei dem 484 Teilnehmer aus 17 europäischen Ländern anwesend waren, darunter 79 deutsche Eisenbahner. **Der Präsident der Bb-Direktion Linz, Dr. Leopold Kassecker**, selbst alter Esperantist, hieß den Kongreß in **Esperanto** auch im Namen des österr. Verkehrsministers, Dipl. Ing. Karl Waldbrunner, und des Generaldirektors der ÖBB, Hofrat Dr. Maximilian Schantl, herzlich willkommen. Wörtlich sagte er u. a.: „Beweist unseren Berufskollegen, unseren Gewerkschaften und dem breiten Publikum, daß Eure Kongresse trotz aller Internationalität ganz einfach durchgeführt werden. Es würde uns alle freuen, wenn unsere Eisenbahner im Dienst Esperanto

zu verwenden könnten. Dann käme es nicht mehr vor, daß die sprachgewandtesten Beamten, deren Brust mit 3 oder 4 Sprachschildchen dekoriert ist, hilflos Slowenen, Tschechen oder Ungarn gegenüberstehen.“

Der Bürgermeister von Linz, Dr. Ernst Koref, begrüßte ebenfalls in **Esperanto** die Ideen der Esperanto-Bewegung. Nach kurzen Ansprachen von Vertretern der Eisenbahn-Verwaltungen, Gewerkschaften, kulturellen Organisationen und Landesverbänden hielt Hofrat Hugo Steiner die Festrede, die dem Leben und Wirken des vor 100 Jahren geborenen Schöpfers der Internationalen Sprache, Dr. Zamenhof, gewidmet war.

In 3 öffentlichen Arbeitssitzungen wurden organisatorische und fachliche Probleme behandelt. Hierbei zeigte es sich u. a., daß voraussichtlich im kommenden Jahr die Jugoslawischen Bahnen Esperanto im Kursbuch einführen werden. Auch bei den ÖBB und DSB sind die Aussichten in dieser Beziehung günstig.

Außerdem wurden zwei **fachliche Vorträge** gehalten, nämlich von Herrn Bürger, Linz, der eine in Esperanto übersetzte Zusammenfassung eines Vortrages von Hofrat Dr. Bruno Kepnik über das Thema: „**Entwicklung und Wesen des Eisenbahnfahrplanes**“ verlas, und ein **Farbbildervortrag über die Signale der ÖBB** von Kol. Ulrich, Linz.

Im Zusammenhang mit dem Vortrag über das Fahrplanwesen wurde eine außerordentlich reichhaltige **Ausstellung von amtlichen und nichtamtlichen Kursbüchern** sowie dienstlichen Buch- und Bildfahrplänen aus ganz Europa gezeigt, deren gesamtes Material zunächst in Linz aufbewahrt wird und bei Bedarf auch anderen Ländern zur Verfügung steht.

Weiterhin war eine **internationale Ausstellung von Zeichnungen** über das Eisenbahnwesen zu sehen, die sämtlich von **Eisenbahnerkindern** angefertigt waren. Hier war nicht nur Europa vertreten, sondern auch Australien, und vor allem aus Japan waren zahlreiche besonders hübsche Zeichnungen ausgestellt.

Der Vorstand des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten und die Delegierten der Landesverbände wurden durch den Präsidenten der Bb-Direktion Linz empfangen. Anwesend waren außerdem der Rechts- und der Verkehrsdezernent und der Betriebsleiter der BD Linz. Dieses zwanglose Beisammensein dauerte fast zwei Stunden und zeigte besonders deutlich, wie aufgeschlossen die leitenden Herren der österreichischen Eisenbahnverwaltung gegenüber der Esperanto-Bewegung sind. Dies kommt auch darin zum Ausdruck, daß die Linzer Gruppe der Eisenbahner-Esperantisten ein eigenes Heim besitzt, dessen Räume von der Eisenbahn zur Verfügung gestellt worden sind. Es ist mit Dienstfernsprecher ausgerüstet. Die Kosten für Heizung, Beleuchtung

Atentu !

Notu jam nun: La 17an kaj la 18an de oktobro okazos la 3a jarkunveno de la germanaj fervojistoj esperantistaj en Dortmund.

Dum la semajno antaŭe estas planataj du paralelaj Ĉeh-metodaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj (precipe estontaj kursgvidantoj) kun postaj ekzamenoj, Malmultekosta, instrua, alloga. Samtempe okazos en Dortmund la Federacia Gardenekspozicio! Eksterlandanoj kore bonvenaj.

Achtung !

Notieren Sie schon jetzt: Am 17. und 18. Oktober findet die 3. Jahresversammlung der deutschen Eisenbahner — Esperantisten in Dortmund statt. In der Vorwoche sind 2 Kurse nach der Cseh-Methode geplant, je einer für Anfänger und Fortgeschrittene (besonders auch für künftige Kursusleiter), mit anschließenden Prüfungen. Billig und lehrreich.

Gleichzeitig ist in Dortmund die Bundesgartenschau! Ausländer sind herzlich willkommen.

Atentu !

Achtung !

und Reinigung trägt die Verwaltung.

Der unterhaltende Teil des Kongresses bot sehr viel Abwechslung. Eine große Auswahl lohnender Ziele stand für Ausflüge zur Verfügung, dgl. konnten verschiedene Fabriken, Schulen, Kirchen und das Eisenbahnausbesserungswerk besichtigt werden. Ein Abend gehörte der leichten Muse in Form österreichischer Musik, ein anderer bescherte drei beifällig aufgenommene Amateur-Schmalfilme der Braunschweiger Eisenbahner-Arbeitsgemeinschaft Esperanto-Filmo-Germanujo. Ein weiterer Abend führte die Kongreßteilnehmer beim internationalen Ball zusammen, der schon infolge der ausnehmend schönen Tanzvorführungen und des geschmackvollen äußeren Rahmens als besonders gelungen bezeichnet werden muß. Am Rand sei vermerkt: Man hatte viel Platz zum Tanzen.

Für den Kongreßausflug stellte die ÖBB einen Sonderzug mit Gesellschaftswagen zur Verfügung, der während des einzigen Regens der ganzen Woche von Linz über Steyr — Hieflau nach Bad Ischl fuhr — durch eine ganz herrliche Landschaft also. Bei alpinerischer Musik, Tanz und Gesang verging die Zeit dort viel zu schnell. Der Präsident der FISAIC, Herr Mollion, Paris, zeichnete den Leiter der österr. Eisenbahner-Esperantisten, Dipl. Ing. Fritz Tschom und seinen Sekretär Louis Angermeyr mit der goldenen und silbernen Medaille für soziale Verdienste aus. Diese Auszeichnung galt der ganzen Eisenbahner-Esperantobewegung.

Als nächste Kongreßorte wurden bestimmt:

1960 Helsinki, 1961 Barcelona, 1962 Brüssel oder Budapest.

Ein Nachkongreß wurde in Wien abgehalten. Er stand unter Leitung von Hofrat Hugo Steiner. Der IFEF-Vorstand und die Landesdelegierten wurden vom Generaldirektor der ÖBB, Hofrat Dr. Maximilian Schantl, empfangen.

Zugegen war der Leiter der österr. Eisenbahner-Gewerkschaft, Richard Freund. Beide versicherten ausdrücklich die Eisenbahner-Esperanto-Sache ihrer Hilfe. Sämtliche Teilnehmer des Nachkongresses wurden durch den Wiener Oberbürgermeister, Franz Jonas, und dessen Gattin

in der Hofburg empfangen. Beide sind selbst Esperantisten, so daß die Verständigung reibungslos funktionierte und manch launige Rede zu hören war.

Alles in allem: Ein arbeitsreicher, schöner, gelungener Kongreß.

Giessner

Ekskurso al la ĉefriparejo kaj VOEST

Estis pli ol 100 gekongresanoj, kiuj kolektiĝis merkredmatene (13-5) ĉe la pordego de la fervoja ĉefriparejo en Linz, la sola por elektraj lokomotivoj en Aŭstrio. Tre, preskaŭ tro detale, ni aŭdis de kompetentulo klarigojn pri la organiza sistemo de la sekcioj, sed poste kaptis nian atenton la konsterniga amaso da partoj kaj partetoj de malmuntitaj elektraj lokomotivoj. Ni vidis la fortajn ĉasi-framojn, la boĝiojn kun komplika oleprema brems-sistemo por la pivotlagro, la pelradojn kun risortpot-kluĉiloj, la rotorojn de la elektro-motoroj ĉiugrandaj, kiujn oni bandaĝis por enteni la volvaĵojn dum la rapida rotacio, kaj mil aliajn detalojn, kiujn ope menciis ĉi tie ne estas eble. Neniu el ni pridubis ke la granda nombro de lokomotiv-tipoj necesigas apartan postenon sole por zorgi, ke ĉiuj partoj post riparo diversloka revenas ĝustadate al la munthalo por konsistigi denove kompletan lokomotivon. Kun kapturniĝo pro ĉio vidita ni iris al tri atendantaj aŭtobusoj, ĉar VOEST estis la ĉefa celo de tiu duontaga ekskurso.

Juna gvidanto de la fabrikpolico akceptis nin ĉe la pordego de la uzino, kies nomo VOEST signifas „unuigitaj aŭstriaĵ fer-kaj ŝtal-uzinoj“. Li avertis nin pri la granda danĝero ĉirkaŭonta nin ĉie kaj kondukis nin unue al energicentro. Tie ni eksciis, ke VOEST mem produktas el karbo la koakson, kiu necesas por fandi la ercon en la altfornoj. Dum tiu procedo estiĝas, krom

aliaj produktoj, multe da gaso kiun oni bezonas por produkti kurenton en la elektro-generatoroj. Tiujn gigantajn, duetaĝajn generatorojn ni vidis — kaj aŭdis —, ni iris al la erc-kaj karbohaveno, kie diversnacaj ŝipoj atendis, kaj kie la fabriko ensuĉas dum 10 horoj la saman kvanton da akvo el la Danubo, kiam la milionurbo Vieno konsumas dum unu tago. Poste venis por ni unika travivaĵo: el nur kvinmetra distanco ni vidis la fajre fluidan feron eligantan malsupre ĉe unu el la kvin altfornoj. Poste ni iris — ĉiam inter du

Das neue IFEF-Abzeichen (vgl. den Kongreßbericht in dieser Nummer) ist zum Preise von 8 östr. Schillingen zu beziehen bei Eisenbahner Esperanto-Fachgruppe, ÖBB-Direktion Linz/Donau, Bahnhofstr. 3. Sammelbestellungen sind zu empfehlen.

flavaj linioj sur la planko — al la ŝtalfarejo, kie laŭ tri procedoj (Siemens-Martin, Elektro-forno kaj Linz-Donau-Procedo) estiĝas ŝtalo el al fresfandita fero per reduktado de ĝia karbon-enhavo kaj diversaj aldonoj. La ruĝardajn ŝtalblokojn ni sekvis al la laminatoj, observante kiel ili pli kaj pli maldikiĝis inter la senkompatemaj ŝtalcilindroj, ĝis fine rapidege kaj tondre eliĝis larĝaj, maldikaj ladoj, ŝpruce malvarmigataj. Plene saturitaj je novaj impresoj ni forlasis tiun fabrikegon post abunda tagmanĝo en la kantino.

Ritterspach

Kuraĝa respondo al la redakcio de „Der Deutsche Eisenbahner“

Betreff: Anfrage über den Wert der Esperantosprache.

Gerade wir Eisenbahner und besonders wir Gewerkschaftler haben die Verpflichtung, helfend dazu beizutragen, daß auch der einfache Mann sich mit den Menschen der Länder, welche unsere Schienen schon seit Jahrzehnten verbinden, mit Hilfe der neutralen und leichter als irgend eine andere Fremdsprache erlernbaren Sprache „Esperanto“ verständigen kann.

Wieviel wertvoller wären die Bestrebungen internationaler Verständigung, falls die wichtigste Voraussetzung nach der Bereitschaft — nämlich eine ge-

meinsame Sprache — vorhanden wäre? Das persönlich gesprochene Wort von Mensch zu Mensch ermöglicht erst eine wahre Verständigung. Nur wer es erlebt hat, weiß, was es für die Völkerverständigung bedeutet, wenn Menschen aus 30 bis 40 Nationen während internationaler Kongresse oder Fachtagungen sich mühelos mit Hilfe von Esperanto verständigen können und jeder jeden versteht. Wie erlebnisreich müßten internationale Jugendlager sein, bei denen nicht nur Jugendliche aus 2 bis 3, sondern aus 10 bis 20 Nationen ihre Ferientage erleben?

Liebe Redaktion, habe daher

den Mut und bringe laufend aufklärende Artikel über das Wesen der Esperantosprache und einen Sprachlehrgang, denn die Zeit hierfür ist reif. In den 20er Jahren war es die Gewerkschaftsbewegung gewesen, welche wesentlich zur Verbreitung von Esperanto beigetragen hat. Aber leider ging durch das Verbot während der NS-Zeit viel verloren. Hilf nun auch mit, den Spruch wahr zu machen:

„Schienen verbinden die Länder, Esperanto verbindet die Völker“.

Unsere heutige Jugend ist nicht schlechter als die frühere, nur will sie angesprochen werden, denn viele andere Dinge, Reize und Einflüsse sind vorhanden, welche für ideelle Bestrebungen wenig Raum übrig lassen.

König

Lernt Esperanto durch „Die Briefschule“

Ein Führer für den Selbstunterricht

Ein langjähriger Eisenbahner-Esperanto-Freund, samideano Daniel Jäger, Frankfurt (M), hat es unternommen, für „Die Briefschule“ einen Esperanto-Fernkurs auszuarbeiten.

In dem nun vorliegenden Beratungsbrief 1 wird einleitend ein kurzer Abriss über die wechselvolle Geschichte des Welt-sprachengedankens gebracht, der den Leser in leicht faßlicher Form in das Thema einführt. Eine knappe, erschöpfend gehaltene Besprechung des dem Lehrgang zugrunde gelegten Esperanto-Lehrbuchs (Wingen „Wir lernen Esperanto“) schließt sich an und verbindet Hinweise und Anregungen für die praktische Arbeit, die der Verfasser aus seiner mehrjährigen Erfahrung als Unterrichtsleiter in Anfänger- und Fortgeschrittenenkursen schöpfen konnte.

In enger Anlehnung an das Wingensche Lehrbuch wird dann der Lehrstoff aufbereitet; zahlreiche Beispiele vertiefen das Vorgetragene, und entsprechende Übungs- und Prüfungsaufgaben vermitteln ein sicheres Wissen. Alles in allem: ein wohl gelungenes Werk, zu dem man Verfasser und Herausgeber beglückwünschen darf.

Die vorliegende Arbeit, die Anerkennung und aufmerksame Beachtung verdient, wird eine spürbare Lücke schließen und für manchen hochwillkommen sein. Besonders die Eisenbahner-Esperantisten sollten nachdrücklichst allen, die durch dienstliche oder persönliche Verhältnisse an der Teilnahme eines Unterrichtskurses verhindert sind, auf diesen Fernlehrgang aufmerksam machen. Der praktische Nutzen, der durch diesen Fernlehrgang im

„Niemandland“ gestiftet werden kann, dürfte nicht zu übersehen sein.

Lehrmaterial: Lehrbuch und 6 Beratungsbriefe mit Übungs- und Prüfungsaufgaben (die zur Korrektur eingesandt werden können).

Gebühren: Jeder Beratungsbrief 2,50 DM, zuzüglich einer einmaligen Einschreibgebühr von 1,25 DM.

Damit sind neben den Beratungsbriefen und dem Lehrbuch auch alle Korrekturen, die Beratung und die sonstigen Dienste (Ausstellen einer etwa gewünschten Studienbescheinigung) mitbezahlt. Nur Porto muß zusätzlich getragen werden.

Anmeldung: „Die Briefschule“ GmbH Frankfurt (M), Untermainkai 66.

Auf Wunsch kostenlose Sonderprospekte.

Auch für Kursusleiter und Unterabteilungsleiter sind die „Beratungsbriefe“ ein willkommener Helfer. Für sie vermittelt samideano Jäger die Beratungsbriefe zum ermäßigten Preis von 1,— DM je Stück. Bestellung nur direkt bei B.-Amtmann Jäger, BD Frankfurt/M., Prüfungsamt.
Lang

ordeno pro meritoj de la Germana Federacia Respubliko.

Ni germanaj fervojistoj esperantistaj tutkore salutas kaj gratulas.

(Ehrenvolle Auszeichnung für Hofrat Hugo Steiner!

Für seine großen Verdienste um Freundschaft und Verständigung

unter allen Völkern der Welt wurde unserem hochverehrten Freunde und Pionier der internationalen Sprache Esperanto, Herrn Hofrat Hugo Steiner, Wien, das Verdienstkreuz Erster Klasse zum Verdienstorden der Deutschen Bundesrepublik verliehen.)

El la grupoj

Atentu! Grava adresŝanĝo!

La prezidanto de GEFA, kolego Giessner, translokiĝis al la stacio **Elze (Han.)** (linio Hannover — Göttingen).

Nova deĵora kaj privata adreso do estas: **Bahnhof Elze (Han.)**. Bonvolu korekti la liston en Bulteno 2/59, paĝo 3.

Internaciaj someraj ferioj en Besançon

La franca GEE (Grupo de Esperantistaj Edukistoj) organizos internacian someran restadon en Besançon, de la 15a ĝis la 31a de Aŭgusto.

Se estas sufiĉe da aliĝantoj, oni provos aranĝi malmultekostan komunan restadon.

Aliĝotizoj sendotaj al: S-ino Trésorier, 2, rue des Lilas-BESANÇON (Doubs); por unu persono: 1800 Fr; por du samfamilianoj: 3000 Fr.

Pluaj detaloj haveblaj.

Eksterordinara honorigo al Kortega Konsilisto Hugo Steiner!

Pro liaj eksterordinaraj meritoj pri amikeco kaj kompreno inter la popoloj tutmondaj estis prezentata al nia altsatata amiko kaj pioniro por la internacia lingvo Esperanto, s-ano Kortega Konsilisto Hugo Steiner, Wien, la promerita kruco unuaklasa al

Lübeck. Post 4-jara gvido la ĝisnuna estro s-ano Hermann pro deĵoraj kaj sanecaj kaŭzoj deponis sian oficon kiel grupestro de la Fervojista Esperanto-Grupo Lübeck. Kiel nuna prezidanto estis elektata s-ano Liedtke, VK I Lübeck. Kasisto estas s-ano Halfar.

Hermann Mainz. La novan jaron ni komencis en nia regiono ankaŭ kun bonaj intencoj. — La jam pasinta kvarono de la jaro 1959 veturis plane. — Niaj membroj korespondas vikle kun gesamideanoj kaj grandparte kun kolegoj en Nederlando, Danlando, Francio, Italio, Japanio, Afriko, Venezuelo kaj kelkaj aliaj. Laleterkurso nuntempe pritraktas la sesan instruleteron; ĉi tiu leterkurso montriĝis tre taŭga kompreneble por la je Esperanto interesitaj kolegoj, kiuj havas malregulan deĵoron. La servo de la propra biblioteko, kiu estas administrata de kolegoj de la fervojista Esp.-grupo Kaiserslautern (riparejo), estas je ĉies dispono. — En Heidelberg renkontis la 12. 4. 59 okaze de la ĉefkunveno de Sudokcidentgermana Esperanto-Ligo ankaŭ kelkaj fervojistaj samideanoj. La tre bone aranĝita programo enhavis kelkajn verajn ĝuojn por esperantistaj oreloj. Inter aliaj parolis sinjoro d-ro Herrmann pri la nuna stato de la Esperanto-Eŭropo-kampanjo, kaj pri la jam faritaj paŝoj rilate la, de ĉefurbestro Stein, Mainz, gvidata kaj iniciata provo, gajni la urbestrojn de eŭropaj urboj por Esperanto. Samideano el Litvio donis al la partoprenantoj per interesa prelego bildon pri sia hejmo. Unika estis la prelego de jugoslava samideano. En unu horo li gvidis la aŭskultantojn tra la gaja parto de la Esp.-literaturo. Anoncita en la programo estis kiel „revigliĝilo“ la sondisko, kiun kreis la kolegoj de la fervoja Esp.-grupo Braunschweig. La sondisko estas nun jam konata en ĉiuj esperantistaj randoj kaj ĝi havas sennumbrajn amikojn. —

Lumbildoj pri la Esp.-seminario en Bottrop, montritaj de s-ano Radam, Mannheim, finis la longan vicon de belaj, interesaj programpunktoj. — Ritthaler

Nürnberg. La Esperanto-Ĉeh-kurso elementara finiĝis en Aprilo. 8 kursoj vizitis ĝin ekde la komenco ĝis la fino. Ĉiuj partoprenintoj aliĝis al la Fervojista Esperanto-Grupo Nürnberg.

Plattling. En la jaro 1951 la loka grupo de la BSW organizis la unuan kurson por komencantoj en nia urbo kun 12 partoprenintoj. Kvankam la kurson finis nur tri kolegoj, tio estis la komenco de la esperanta vivo tie ĉi. Pere de novaj kursoj ni gajnis kelkajn novajn adeptojn por nia ideo. Baldaŭ ni komencis korespondi kun eksterlandaj gesamideanoj. Unu kolego korespondis kun Francio, Anglio kaj Japanio, alia kolego kun Hispanio kaj Francio kaj la tria kolego kun Hispanio. La komunikilo kun Francio kaj Hispanio daŭris ĝis nun kaj certe daŭros. Kompreneble ni skribis ankaŭ al aliaj landoj kaj ricevis poŝtaĵojn el multaj landoj. Plej bone funkciis ĝis nun la interturo kun la geamikoj de la franca urbo Le Mans. En Septembro 1956 vizitis nin naŭ geamikoj el tiu urbo kaj restis ĉe ni dum unu semajno. Honore al niaj gastoj ni aranĝis i. a. intertrifigan vesperon, solenan akcepton ĉe la urbestro kaj ekskursojn al la Bavaria Arbaro kaj al Passau. Tiu vizito estis por ni granda sukceso, ĉar la loka gazeto skribis kelkajn favorajn artikolojn pri nia afero. Por la tuj poste okazinta kurso sin anoncis 19 personoj.

En junio pasintjare ni respondis la viziton de la Le Mans-anoj kaj veturis sesope al tiu urbo. Ni travivis ĉe niaj geamikoj neforgeseblan semajnon. Ni eksciis la faman francan gastecon, gajnis belegan impreson de Le Mans kaj konatiĝis kun multaj samlingvanoj.

Bernhard

Ne forgesu — Dortmund vokas

Redakcio: Paul Steinig, Bremen, Ausbesserungswerk, Deĵoradreso: TBOI Steinig, AW Bremen, Basa Bremen 835/348. Manuskriptojn bonvolu sendi skribitajn se eble per skribmaŝino unu-kaj duonliniajn al la redakcio, tradukaĵojn kun la originala teksto Sendino por manuskriptoj 15. I., III., V., VIII., X.

Preso: Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn